



*EKO 2020-59 sendita el Budapeŝto,
la 26an de decembro, kun la kontrolo funkcio en Benino.*

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Enhavo

- Kebekio transiras al blogado
- Vortaraj proponoj en Hungario
- Turka retkurso por Esperanto
- Universitato de Ŝirazo, Irano
- Slovenio agas per revua reviviĝo

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

Esperanto-Societo Kebekia (ESK) transformas sin

Turniĝas plia paĝo en la vivo de ESK -- venas al la fino la eldonado de *La Riverego* en la nuna PDF-formato -- ĝi transiros al la bloga formato (legu pri tio en mia redakcia artikolo). Tiu ĉi numero estas rekorda numero (74-paĝa!) kaj, sendube, la plej bunta el ĉiuj, kiujn mi redaktis en la lastaj dek jaroj! Ja eĉ se la Montreala UK ĉi-jare ne povis okazi pro la pandemio, Montrealo (kaj Kebekio kaj Kanado pli larĝe) brilis dum la virtualaj someraj eventoj -- legu detalajn raportojn pri la bunta virtuala somero ĉi-numero!

Ĉi-jare ESK eldonis rekordan kvanton da eldonaĵoj en unu jaro -- tri libroj, plus la famaj poŝtkarto kaj poŝtmarko de Espero (la unua esperantlingva poŝtkarto el Kanado). Legu kiel mendi ilin! Ĉi-numere atendas vin ankaŭ tri bonegaj artikoloj el Hispanio: pri la ZEO (=Zamenhofa / Esperanta objekto) super la Niagaro. José Antonio del Barrio de Hispana Esperanto-Federacio rakontis pri tio.

Alia artikolo estas pri Eduardo Vivancos, veterano de la hispana civila milito kaj unu el pioniroj de E-movado, kiu loĝas en Toronto kaj kiu centjariĝis ĉi-septembre (ĝin verkis Xavi Alcalde, kiu vizitis Kanadon en 2017 por intervjui Eduardon). Estas ankaŭ artikolo pri la tri popolaj himnoj: Belgio, Aragono (Hispanio) kaj (jes!) Kebekio! Ĝin verkis Eduardo Berdor (Hispanio), specialisto pri la franca lingvo kaj kebekia muziko. Krome, atendas vin amuza raporto pri la 100-a Kongreso de la Sildava Esperanto-Asocio, valora artikolo, kiu klarigas kial klimato ŝanĝiĝas... kaj pli! Ne hezitu plusendi tiun ĉi numeron al viaj amikoj! <http://www.esperanto.qc.ca/fr/riverego142-144/>

Jĕnja Amis, la redaktoro

Hungario daŭre aktivas vortare

La tuŝtelefona vortaro EHV Esperanta-hungara vortaro kaj EHV Hungara-esperanta vortaro (ĝis litero S inkluzive) akireblas nun krom por Android, ankaŭ por iPad kaj iPhone ĉe la suba ligo. La finajn literojn Sz-Z oni ricevos aŭtomate, kiam ili pretiĝos.

<http://vortaro.hu/vortaro.htm>

Dankon al la granda laboro de Gábor Deák-Jahn!

Jozefo Horvath www.vortaro.hu

250+ FAKAJ ESPERANTO-VORTAROJ EN LA RETO!

Kolekto de Esperantaj fakaj vortaroj kaj terminaroj, troveblaj en interreto. La vortaroj kaj terminaroj estas **libere uzeblaj, legeblaj kaj elŝuteblaj!**

La kolekto inkluzivas ankaŭ laŭtemajn vortarojn, kiel tabuaj vortoj, kuirado, rim-vortaroj, maldecaj vortoj, ĵargono, ktp.



La kolekto estas parto de **Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB**, ĝi estas daŭre aktualigata, se vi konas mankantan eron - bonvenas via sciigo! Adreso de la vortara kolekto: <http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/> .

Szilvási László

Universitato de Shiraz, okazis tritaga seminario

Irano agadas daŭre en la reto, interalie per apogo de la AMO-programo. Nun ĝi kontribuas al nia universitata agado, pere de ege renoma irana universitato. Dekstre ĝia sigelo.

La filmoj de ĉiuj tri tagoj estas spekteblaj en la jutuba kanalo de UEAviva:

<https://www.youtube.com/watch?v=ZAUIElqUu50>

<https://www.youtube.com/watch?v=T-F6eyXZ4-A>

kaj

<https://www.youtube.com/watch?v=FA5zqgXrHQc&t=4327s>



Turka kurso prinotita en <edukado.net>

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de *google.meet*, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temo:

22/11 Akuzativo
29/11 Transitiveco
06/12 Participlaj
13/12 Korelativoj
20/12 Prepozicioj
27/12 Sufiksoj
03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Slovenio tamen plue aktivas

Ĉiuj niaj klopodoj kontakti la Landan Asocion malsukcesis. Tamen, jen bonvena informo (prenota en <Landa Parad'> de UEA kaj enprenota de la Eŭropa Komisiono.

Bonvolu legi (aŭ almenaŭ trafoliumi ☺) la novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj 2020-4 (decembro)*. Slovene komence, Esperanto en la dua duono.

Ĉiuj numeroj de la bulteno estas al dispono per la ligilo de la Sovenia Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>.

Redaktoro: Ostoĵ Kristan <kristan.ostoj@t-2.si>

ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE	SLOVENIA ESPERANTO-LIGO
INFORMACIJE	INFORMOJ
Leto / jaro 25, ŝt. / n-ro 4	december / decembro 2020
Uvodnik	Frontartikolo
	Ĉiuj, ne koncerne la statistikan regionon aŭ komunumon; gravas nur, ke oni havas liberan tempon dum difinitaj fiksataj horoj. La bezonata ekipaĵo konsistas el hejma komputilo kun laŭtparolilo kaj eble videokamo.

=====**Vortoj** 550 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.